

LA BELA MONDO

PAGO POR TURISMO, BANOJ, TRAFIKO KAJ SEMAJFINO + NUMERO 11 + HEROLDO DE ESPERANTO, N-RO 4 (709)

Aŭgusto la Forta, Dresden kaj ĝiaj kasteloj.


En februaro 1933 estos pasintaj 200 jaroj de post la morto de Aŭgusto la Forta, elektprincino de Saksujo, reĝo de Polujo. En la nokto al la 1-a de februaro 1733, iom antaŭ la kvara matene, li forpasis. Pompege li estis entombigata en la katedralo de Krakovo, la ripozadejo de ĉiuj reĝoj de Polujo. Sed lian koron oni transportis — laŭ deziro de l' mortinto — en arĝenta ujo al Dresden kaj entombigis ĝin en la malnova princa kripto de la kortega preĝejo. Aŭgusto la Forta — jen la princo, al kiu Dresden dankas ankoraŭ nun sian mondfamon en la fremdultrafiko internacia.

De post la frua surtroniĝo en aĝo de nur 24 jaroj la princo estis regata de la forta volo kaj dezirego, plibeligi sian rezidejon tiel, ke ĝi povu konkuri kun la plej belaj urboj de Eŭropo. Li volis havigi al Dresden ĉiujn belaĵojn, kiujn li estis vidinta en kolektajoj kaj konstruaĵoj en Paris, Madrid, Firenze, Wien kaj aliloke. La juna princo kaj nuna suvereno ja konis duonon de la mondo civilizita de sia granda kavalirovojaĝo, kiu tiutempe finis la edukadon de juna aristokrato. Sian politikajn celojn la suvereno ne atingis, kaj antaŭ la morto li devis timi por la estonteco de Saksujo. Sed en la historio de germana arto lia meritplena nomo estas enskribita per oraj literoj.

Neimagebla estas la germana barokstilo sen la saksa, sen la kreaĵoj de Pöppelmann, Permoser, Dinglinger kaj de la inventinto de la porcelano, Böttger. Al ili ĉiuj Aŭgusto donis monon kaj alian subtenon kaj ĉefe artan instigon por realigado de liaj projektoj. Nur tiel povas esti komprenata la iĝado de la plej fama konstruaĵo Dresdena el tiu tempo, la „Zwinger“. Aŭgusto la Forta, la pompema Wettin'ido, bezonis laŭ merkantilisma principo viziton de multaj fremduloj, aĉetantaj en lia rezidejo la artaĵproduktojn enlandajn, nome porcelanon kaj pintojn. Sole festoj kaj precipe sportaj ludoj de la nobeloj povis kaj devis allogi la fremdulojn. Krom areno sur la „Altmarkt“ baldaŭ estis ligna luktejo sur la nuna „Theaterplatz“. Sed ĉio ŝajnis tro simpla al la antaŭenvidanta Wettin'ido. Li komenciĝis konstruadon de oranĝujdomoj, de la famkonata „Zwinger“-ĝardeno. Bedaŭrinde ĝi situis tute proksime al la tiamaj urbofortikaĵoj. Militoj kaj bruloj ofte difektis ĝin. Sed ree kaj ree ampleksaj renovigoj restarigis ĉi tiun plej belan kaj vivpian monumenton de la germana baroko.

En la jaroj 1694 ĝis 1733 Aŭgusto konstruigis de la arkitekto Pöppelmann en Moritzburg apud Dresden unu el la plej belaj ĉaskasteloj. La ĉaskastelo Moritzburg ne nur estis bele situanta, sed ebligis grandstilan reprezentadon tiom satatan de Aŭgusto. Ekzistas malnovaj tielnomataj „registroj por bonveno“ — ĝis de la jaro 1698 — kiuj rakontas multajn interesajn el la vivo de la princo. Ekzemple oni trovas sub la 11-a de februaro 1728 la nomon de la prusa reĝo Frederiko Vilhelmo I-a kaj de la kronprinco, la pli malfrua reĝo Frederiko la Granda. La reĝaj gastoj el Berlin estis invititaj por partopreno al la karnavalfesto en Dresden.

Intertempe Moritzburg fariĝis kulturhistoria muzeo, kiu intime kaj senpere revivigas la saksan kulturon de tri jarcentoj en unika maniero. Malproksimen salutas la kvar rondaj kastelturoj, kiuj en pasinta tempo enhavis la ĉambrojn por la gastoj. Nun en tiuj luksaj ĉambroj oni instalas belegan porcelan-kolektaĵon, kiu montras la artperiodojn de Aŭgusto la Forta ĝis Frederiko Aŭgusto la Justa. Rajte ĉi tie la pro-



Dresden. — Wall-pavilono de l' Zwinger.

duktaĵoj de la Meissen'a porcelanfabriko okupas plej ampleksan spacon, ĉar ĝi ja estas fondita de Aŭgusto, kiu per tio donis fortan impulson ne nur al sia lando, sed al tuta Germanujo kaj Eŭropo rilate al la pasio por porcelanaĵoj.

Kiel profunda estis la intereso de Aŭgusto por ĉiuj artaj kaj sciencaj aferoj, oni konstatas el la ne multe konata fakto, ke li ebligis per monsubteno sciencon esplorvojaĝon al Afriko. Du jarojn antaŭ lia morto, en 1731, ĝi startis al Alĝerio kaj Tuniso. Ĝi havis la taskon kapti sovaĝajn bestojn por la princa bestejo kaj aĉeti sklavojn kiel bestgardistojn. La princo postulis, ke tion kion oni ne povas alporti vivanta, oni bone konservigu, ke la objektojn oni „diligente pentru“ kaj ke oni tiujn ĉi pentraĵojn same kiel zorge skribitajn taglibrojn sendu plej ofte hejmen. Krom multaj strangaĵoj, maloftaj birdoj ŝtopitaj, insektoj, herboj kaj pentraĵoj la ekspedicio transdonis, reveninte duonan jaron post la morto de Aŭgusto, multegajn bestojn vivantajn kaj semojn de afrikaj kreskaĵoj. Bedaŭrinde la kolektaĵo forbrulis en 1849.

Ĉie kaj ĉie en Dresden kaj ĝia ĉir-

kaujaĵo troviĝas la rememoro al tiu ĉi viro, kies artan instigadon du jarcentoj ne povis forgesigi. En aĝo de preskaŭ 63 jaroj Aŭgusto mortis. Mallonge antaŭ lia morto la ministroj lin demandis, ĉu, se Dio lin forprenos, li volus rekomendi al la pola parlamento sian filcon kiel tronheredanton. Aŭgusto respondis, ke li portis dornan kronon kaj ke li lasas al la libera volo de sia filo la decidon pri la transpreno. La kritikoj historiaj pri la vivo kaj agado de Aŭgusto la Forta estas diferencaj kaj eĉ kontraŭaj. Sed lia plej propra kreaĵo, la belaĵoj, kiujn li havigis al sia amata rezidejo Dresden, restis ĝis nun la celo de ĉiuj amikoj de arto el ĉiuj landoj de l' terĝlobo.

Okaze de la 200-a datreveno de la morto de Aŭgusto la Forta en Dresden estos aranĝataj kultur-ekspozicio pri tiu princo kaj lia epoko (en la rezideja kastelo en Dresden), diversaj festoj en la „Zwinger“, „Granda ĝardeno“, Moritzburg kaj Pillnitz, granda artekspozicio de saksaj artistoj ktp. — Krome pro la 50-a datreveno de la morto de Richard Wagner la Dresdena Opero preparas festludojn de Wagner-operoj, koncertoj kun famaj artistoj kaj orkestroj ktp. dum la tuta daŭro de la somero 1933. Prospektoj postuli de Verkehrsamt der Stadt Dresden, Neues Rathaus, aŭ Dresdner Verkehrsverein, Hauptbahnhof, Dresden.



Ĉaskastelo Moritzburg apud Dresden.

Novlando, „la plej malnova angla kolonio“.

De Chas. H. Stranger, St. John's.

Ĉe la orienta marbordo de l' nordamerika kontinento kuŝas Novlando. Novlando estas la plej malnova kolonio de Granda Britujo kun loĝantaro de nur 250 000 homoj de brita deveno. La enlanda lingvo estas la angla. Novlando estas la deka, laŭ grandeco, el la insuloj de l' mondo, trionon pli granda ol Irlando. Ĝi ampleksas 111 000 km²; dependaĵo de ĝi estas Labradoro kun amplekso de 1,5 milionoj da kvadratkilometroj. Ĝi havas formon de trianĝulo, kies pinto troviĝas en la nordo, kie ĝi estas dispartigita de Labradoro per la mallarĝa markolo de „Belle Isle“ de nur 23 km. La sudokcidenta bazo de „Kabo Ray“ kaj la ĉefurbo St. John's sur la sudorienta marbordo estas je unu grado pli sudaj ol Paris.

Novlando similas al Norvegujo. La multaj profundaj fjordoj ĉirkaŭ la tuta insulo estas ŝirmitaj de altaj bordkurtaĵoj. Ĉe sunbrilo en la klara, hela marakvo de l' golfoj oni havas mirindajn, pentrinajn impresojn, kiuj devas viviĝi la artan senton de ĉiuj, kiuj admiras la belecon de la naturo. Speciale la okcidenta parto de la insulo ĉe „Bay of Island“, ĉe „Baune Bay“ St. Paul's Julet „Hawkes Bay“ povas esti komparata rilate belecon de l' pejzaĝo kun la plej grandaj belaĵoj konataj.

Je la orienta flanko de la insulo estas la „Nova Mond-insulo“, inter kiuj la plej fama estas tiu de „Dildo Run“. Tie oni povas veturi multajn mejlojn sur la trankvila marakvo. Alternas belegaj bildoj. Ĉiujare la nombro de turistoj, kiuj vizitas Novlandon, pligrandiĝas, ĉar la somera tem-

peraturo estas agrabla. En vintro la termometro malofte malaltiĝas ĝis nulo.

La plej belaj monatoj estas julio, aŭgusto kaj septembro. Sed ankaŭ en oktobro la vetero ankoraŭ estas bona. En tiuj ĉi monatoj la lando montras sian plej impresan aspekton. Oni povas sin imagi en iu bela parto de Skotlando aŭ Finlando.

La montaro estas fruktodona ĝis la supro. Multvariaj estas la kreskaĵoj. La abio, pinio, acero, avelo kaj betulo estas hejmaj tie ĉi.

La nekulturita lando estas kovrita de riĉa herbar-taĉso, de musko de ĉiuj koloroj. Sovagaĵoj, frambaj, riboj, bluberoj ktp. promesas grandan ĝuon al la bongustema buŝo. Filikoj, multspecaj sovaĝaj floroj belligas la naturon, riĉan je ŝaŭmantaj torentoj, akvofaloj, kaskadoj. Pentristo trovas tie ĉi senfinan laborkampon.

Ankaŭ la minerala riĉeco de Novlando estas granda. Plej konataj estas la krudmineraĵoj de „Bell Island“ kaj de „Conception Bay“. La tieaj fermineraĵoj havas la kvaran lokon en la mond-rezervoj. Lastatempe Novlando akiris la sesan lokon de la kuproproduktantaj landoj de l' mondo. Oni klopodas adapti ĉiujn modernajn metodojn por plibonigi sian pozicion sur la kupro-merkato. Sed krome la lando estas riĉa je karbo, plumbio, arĝento, zinko, glimo kaj konstru-ŝtonoj kiel granito, sabloŝtono, marmoro. Ĉe la insula limo oni trovas bonan ardezon kaj cement-ŝtonojn.

La minerala havaĵo de la insulo taŭgas por allogi entreprenistojn. Kompanioj tro-

vos tie ĉi valoran ekspluatadon. Investado de mono por minejoj de kupro, fero kaj arĝento estas plej rentodona.

La arbaro estas grandega. Grandega areo da nekulturita plugebla lando atendas la disvolvigon. La registaro donas liberan grundon al interesitaj koloniistoj kaj interresuloj pri novaj industrioj.

En lando kun tia arbara riĉeco la paperindustrio havas grandan estontecon.

Apud „Grand Falls“ sur la bordo de l' „River Exploits“ (en la nordo) estas granda paperfabriko de la Angla-Novlanda Disvolviga Kompanio kun moderna elektra instalaĵo. Ĝi fabrikas jare ĉ. 85 000 tonelojn da gazetpapero kaj papermaĉaĵo. „Grand Falls“ havas signifon kiel staploĉelo. Tra la bajo Exploits ĝi havas somere komunikon kun ĉiuj partoj de la lando kaj vintre kun „Hearts Content“ en la Trinity Bay kaj kun St. John's. Tie estas taŭgaj ŝpaltelĵoj por ĉiuspecaj ŝipoj. — Antaŭ kelkaj jaroj oni perfektigis la grandegan paperfarejon en „Corner Brook“ ĉe la Humber River. Kvar maŝinoj ĉiutage liveras 500 t da papero. La kompanio posedas areon kiu donas liveron por antaŭvideble 50 jaroj. La uzino ankaŭ liveras subproduktojn, ĵ. a. ĉiutage 120 t da sulfito. „Corner Brook“ havas tiel bonegan kaj profundan havenon, ke ĝi povus doni lokon por la tuta brita militŝiparo. Ekzistas ankaŭ rekta komunikado kun Kanado kaj Usono. Bonege aranĝitaj kajoj ebligas facilan ŝarĝigon de ŝipoj. La kompanio posedas mem bonajn vaporsipojn.

Novlando estas ĉefe konata pro sia grandega kaj riĉa moru-fiŝkaptado. Ĝi donas riĉan profiton al la lando. Ĝi estas ankaŭ fama pro la kaptado de marsalmoj, harengoj, hipoglosoj, omaroj. Ne malpli multe pro la kaptado de balenoj.

La riveroj kaj multaj lagoj de Novlando estas plenaj de fiŝoj. La fiŝkaptado mem estas satata distrado. Ĉasistoj havas senfinan ebledon ĉasi la noblan cervon, kiu travagas la vastajn ĉasejojn de Novlando. Akompanate de l' kanirohundo la ĉasisto povas bramarsadi montojn kaj valojn por pafi sovaĝajn anasojn, anserojn, galinajojn, pluviojn, numentojn, perdrakojn kaj tetraojn. Ankaŭ lutroj, kastoroj, leporoj kaj kunikoj estas amase troveblaj. Unuvorte: dorado de l' ĉasisto.

Rajte kantas nia fama poeto Robert Gear MacDonald:

Jes, bela estas ĉi en tagoj
De sunsubiro orbrilanta
Ĉe potencaj golfoj, ĉe la lagoj
Land' de fiŝk' kaj roz' floranta!

Novlando nutras 32 000 fiŝkaptistojn, t. e. 13% de la enloĝantaro, krom la bordkaptistoj. La fiŝkaptistoj preferas laboras apud la „Granda banko“ antaŭ la suda bordo de Novlando. Sed ankaŭ ĉe sablobenjoj „Flemish Cap“, 60 mejlojn oriente de „Cape Race“ aŭ norde ĉe la „Virginia Rokoj“ estas ilia laborteritorio. La plejmulto de l' kaptado estas portata al St. John's.

Ĉiujare preskaŭ 10 000 fiŝkaptistoj veturas al nia landa dependaĵo Labradoro por kapti en la markolo de Belle Isle moruojn ktp. Proksimume 5000 fiŝkaptistoj portas sian kaptadon hejmen por sekigado aŭ por vendado alilanden. Sama nombro da ili posedas proprajn instalaĵojn en Labradoro mem, kie ili preparas la kaptadon tuj por la eksporto.

La loĝantaro de Labradoro dumvintre estas 2—3000 homoj. Sed en somero ĝi atingas ĝis 12 000.

La tuta kaptado de moruo estas ĉiujare preskaŭ 6,5 milionoj da kg. Al tiu ĉifero oni devas aldoni la profiton el la gajno de kruda moruĉepata oleo kaj la kvantojn da rafinita moru-oleo por medicinaj celoj. Ankaŭ la preparado de harengoj, hipoglosoj, marsalmoj kaj de l' baleno okupigas apartan industrian.

La ĉefa kaptado estas vendata al transmaro, ĉefe al la havenoj de l' Mediteraneo, al Okcidenta Hindujo, Sudameriko, ofte al Germanlando.

Ĉefa apogejo de Novlando estas nia ĉefurbo St. John's mem. Ĝi estas ĉe la plej sudorienta bordo. Venante de l' Atlantiko oni estas agrable surprizata, kiam alveturanto tra la markolo „Narrows“ oni vidas la belegan panoramon de l' ŝirmita haveno kaj de la urbo mem, kiu estas preskaŭ kvadrato konstruita kaj tiel moderne instalita kiel ĉiu amerika urbo. Larĝaj stratoj salutas la alvenanton. Boninstalataj aŭtomobilŝoseoj iras ĝis „Concepcion, Trinidad kaj Placentia Barioj“ ktp.

Bone ekipitaj ŝipoj interligas ĉiujn havenojn (ankaŭ de Labradoro) kun la ĉefurbo. Same estas pri la bone organizita fervojo. Oni demandas, ĉu tie ĉi oni nur ĉasas kaj fiŝkaptas. Nu, mi povas aldoni, ke multaj personoj estas okupitaj kiel metiistoj aŭ komercistoj, fabrikantoj ktp. La kamparo nutras la terkultivistojn kaj la arbaro donas panon al la arbaristoj. Aliaj laboras en la minejoj.

Novlando estas atingebla de Eŭropo en proksimume ok tagoj. De Liverpool rekta linio (Furness Line) iras al St. John's. Vizito al nia lando do ne estas tiel malfacila kiel oni kredas.

Novlando estas tre vidinda. Ĝi estas la dorado de l' ĉasisto kaj la paradizo de l' sportamanto.

Pri grava industrio de nia lando, la fokĉasadado en la glacia maro, mi parolis en dua artikolo sur paĝo 5 de ĉi tiu numero.